

Дмитрий Николаевич Садовников,
Volga, Volga (Stenjka Rasin)

tradukita de Kristian Langgaard

De malantaŭ la insulo
sur la ondoj de l' river'
iras ŝipoj multkoloraj,
flirtas flagoj en aer'.

Sur l' antaŭa Stenjka Razin;
festas la edziĝon li
al princino el Persujo
en varmega amebri'.

Sed la viroj murmuregas:
"Tute li forgesis nin.
Nin virino anstataŭos.
Li fariĝis mem virin'"

Tiun mokon aŭdas Stenjka,
la terura ataman'.
Ĉirkaŭbrakas la personon
li per sia forta man'.

Li la nigrajn brovojn sulkas
Fulmotondro estas li.
En okuloj liaj estas
nun videbla sangebri'.

"Nu fordonu, mi trezoron
la plej belan de l' amant'!"
sonas lia tondrovoĉo
trans la ondojn al la strand'.

La princino mortpaliĝas
(Timo estas en l' okul')
kaj silente aŭdas jenajn
vortojn de la terurul':

"Volga, Volga, patrineto!
Volga, via estu ŝi!
Ne antaŭe Don-kozakoj
donis tian-ĉi al vi!

...

Дмитрий Николаевич Садовников,
Volga, Volga (Stenka Rasin)

tradukita de N. N. 20

Bag om øen, på den brede
underskønne Volgaflod
Stenjka Rasins stolte både
ud på nye togter stod.

På den første høvding Stenjka
sidder selv i bådens stavn,
han på kamp og strid ej tænker,
har prinsessen i sin favn.

Men hans mænd er Donkosakker,
de er vrede, for de ved,
han har glemt dem for en kvinde,
for en nat i kærlighed.

Stenjka Rasin hører latter,
blodet koger i hans bryst
Over Volgas brede strømme
højt nu lyder Stenjkas røst.

.....
.....
.....
.....

.....
.....
.....
.....

.....
.....
.....
.....

.....
.....
.....
.....

...

Inter liberuloj estu
- Volga, Volga, patrinet'
nek malpaco nek batalo!
Tial - jen la virinet'!"

Kaj li ĵetas la persinon
(la plej karan sur la ter')
en la bluan profundaĵon,
kaj ŝin glutas la river'.

"Nun agordu balalajkojn!
Ludi, danci volas ni!
Estu gajaj, kamaradoj
je la belmemor' pri ŝi!"

Jen dum kanto, danco, ludo
sur la ondoj de l' river'
iras ŝipoj multkoloraj,
flirtas flagoj en aer'.

"For at ingen splid skal være
mellem frie mænd,- tag så
Moder Volga, denne kvinde!"
og hans arm om hende lå.

Og han ta'r med stærke arme
da sin brud og kaster ned
/: i de dybe, mørke bølger,
sine nætters salighed. :/

"Men hvad fanden, hvorfor hænger
I med næbbet? Bliv kun ved!
Dans og syng de røversange,
syng for hendes sjælefred!"

Frem fra øen - ud på dybet
stævner Stenjkas Rasin ud
/: med den stærke, stolte både,
sejler fra sin døde brud. :/

*Traduko de la Rusa poeto "Из-за острова на стрежень (Стенька Разин)" de ДМИТРИЙ НИКОЛАЕВИЧ САДОВНИКОВ (Dmitrij Nikolajevič Sadownikow, *1847 – †1883) en Esperanton de KRISTIAN LANGGAARD (*1894 – †1957).*

Arg-478-1036 (2010-03-08 21:19:37)

Mi, Manfred Retzlaff, prenis tiun ĉi esperantigon el la reta kolekto "<http://www.esperantonia.dk>". kiun kunmetis s-ro Lars Kromann (Stenbrydervej 6, Værløse, DK4640 Fakse, Danio, lars.kromann@mail.dk). Vidu la retejon <http://www.esperantonia.dk/volga.htm>. Kristian Langgaard estis dana Esperantista verkisto kaj Esperanto-instruisto. Vidu ekzemple: <http://www.esperantonia.dk/lingvaj.htm>. Pri lia vivo kaj verko vidu ankaŭ la artikolon <http://www.esperantonia.dk/bio-langgaard.htm>.

*Traduko de la Rusa poeto "Из-за острова на стрежень (Стенька Разин)" de ДМИТРИЙ НИКОЛАЕВИЧ САДОВНИКОВ (Dmitrij Nikolajevič Sadownikow, *1847 – †1883) en la Danan de N. N. 20.*

Arg-478-1037 (2010-03-08 12:16:20)

Aperinte en 1947 en la kant-libro "DLEA-Kantaro" eldonita de Dana Laborista Esperanto-Asocio (DLEA), n-ro 100 kaj en la kantlibro "Store Esperanto-Sangbog", SEFO 1939, n-ro 31. Vidu la retejon [esperantonia.dk](http://www.esperantonia.dk) sub <http://www.esperantonia.dk/volga.htm>.